

Sunenergio, 1.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 676, 1976.09.22 & 24 & 25

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ĉiuj scias, ke la robotoj, kiuj esploras la spacon, utiligas pli kaj pli la sunenergian por movi sian kompleksan maŝinaron kaj funkciigi siajn elsendilojn. Kontraŭe al la antaŭvidoj oni rezignis je la atomenergio profite al la sunenergio. Povas esti, ke sur la Tero ni travivas similan senbruan revolucion.

A.- La subita energi-krizo, kies ĉefa kaŭzo estis drasta prezaltiĝo de nafto kaj uranio, havis neatenditan konsekvencon. La registaroj kaj la publiko ĉesis rigardi la fakulojn, kiuj kredas je la sunenergio, kun mokaj okuloj. La kaptado de la senpaga lumo, kiun malavare donacas al ni la Suno, ĉesis esti konsiderata kiel utopiaĵo.

Cl.- Tiun ĉi someron oni povis viziti plurajn ekspoziciojn en Svislando, kiuj raportis pri la nunaj atingiĝoj koncerne la kaptadon de la sunlumo profite al hejtado kaj aerumado de domoj, kuirado, fabrikado de malvarmo, funkciigo de motoroj, de pumpiloj, de televidaj reelsendiloj, ktp. Ni havis la okazon viziti unu el tiuj ĉi ekspozicioj, kaj ni povis konstati, kiom rapide progresas la konoj kaj la eksperimentoj en tiu ĉi fako. Antaŭ du aŭ tri jaroj la projektoj estis pli teoriaj ol praktikaj kaj la registaroj neglektis la raportojn, kiujn ili ricevis tiurilate. Sed subite iuj ŝtatoj komencis subvencii la esploron koncerne la dommastruman kaj industriajn uzojn de la « ora karbo » - nomo, kiun oni komencis doni al la sunenergio, kiam oni kapablas ĝin kapti. Israelo, Japanio, Usono kaj Sovetio ekzemple elspezis dum la pasinta jaro milionojn da frankoj por favori la disvolvigon de avangarda industrio bazita sur utiligo de ora karbo.

A.- Multaj teknikistoj opinias, ke la ora karbo estas realisma alternativo al la nuklea energio, kies malbonflankoj fariĝas pli kaj pli okulfrapaj. Sen prononci nin en tiu ĉi debato por aŭ kontraŭ la atom-energio aŭ por aŭ kontraŭ la sunenergio, ni provos dum elsendaro priskribi la nunajn atingiĝojn koncerne la ekuzon de la ora karbo. Ni evitos tro teknikajn klarigojn. Kaj ni esperas, ke niaj prelegoj helpos vin ekkonsciiĝi pri la novorientiĝo de la teknika esploro, kiu estas pli kaj pli influata de la spaco-esplorado.

Cl.- Ĉiuj statistikoj atestas, ke la prezo de la energio produktata per mineralaj rimedoj ekde nun konstante altiĝas, ĉar ĝi estas ligita al prezaltigaj faktoroj : salajrado kaj rariĝo. Ni scias, ke la salajroj regule altiĝas, ĉar nenie en la mondo la laboristoj akceptas vidi la propran vivnivelon malaltiĝi. Kun la industriiĝo la energibezonoj kreskas. Kreskas la aĉet-ofertoj pli rapide ol la vend-ofertoj, tial nafto, uranio, karbo, gaso, ligno aĉetiĝas ĉiam pli koste.

A.- La konsumado de la ora karbo disvolviĝas alimaniere. La seria produktado de sunlumaj kaptiloj havas la pozitivan rezulton favori prezmalaltiĝon de la sunenergio. La aĉetprezo de industrie produktataj sunkaptiloj malkreskos. Tial rezulte malkreskos la prezo de la kaptita energio. Koncerne la produkton de varmo, la sunenergio jam nun estas konkurenca kun la aliaj energioj. La sola tikla problemo estas la konservado de la sunenergio por prokrastita konsumado dum la noktaj horoj, la sensunaj tagoj kaj la vintra sezono. Miloj da teknikistoj serĉas solvon al tiu ĉi problemo, kiu ankaŭ koncernas la atomcentralojn.

Cl.- Ĉiuj scias, ke la kresko de la energi-konsumado kondukas la industriajn regionojn al ekologia krizo ĉiam pli drama. La sunenergio ekologie estas pura. Ĝi prezentas alternativon al la ekologia krizo, kiun la nuklea energio nur akriĝas. Ni memoru, ke la amasiĝo de

radioaktivaj subproduktoj kaj ties stokado kondukos al elspezoj senĉese renovigeblaj dum dekmiloj da jaroj. Ni troviĝas antaŭ imposta senelirejo, ĉar ni devigas la postajn generaciojn plupagi por energio jam konsumita, kaj la polica kontrolado de la nukleaj rubejoj estas ege kosta. Tiu ĉi kontrolo polica kondukas al la starigo de pli kaj pli potencaj kaj centraligitaj ŝtatoj kaj al limigo de la individuaj liberecoj.

A.- Tio klarigas, kial la armeaj medioj favoras la starigon de atom-centraloj. Ili scias, ke ĉiu nova atom-centralo signifas kreskon de la intervenpovo de la armeo kontraŭ la civila loĝantaro. Kontraŭe la starigo de suncentraloj kondukas al polica malstreciĝo. Tiuj ĉi centraloj reprezentas nenian ekologian danĝeron, kaj ili povas senriske stariĝi ie ajn ; en plena dezerto, sur la supro de monto, sur domtegmento en plena urbo. Disvolvi la konsumadon de la ora karbo egalas disvolvi la individuan liberon. Tial tre verŝajne la registaraj medioj senentuziasme subvenciadas tiun ĉi disvolvadon, dum ili dediĉas miliardojn da frankoj al la starigo de atomcentraloj.

Cl.- La homaro troviĝas antaŭ elekto inter du vojoj. Unu favora al kresko de la registara potenco. Alia favora al individua libero. Estas fakte tre interesa momento. Sed por pli bone kompreni ĝin, estas necese pli bone kompreni, kio estas jam nun la teknikaj realiĝoj de la sunluma kaptado. Pri tiuj ĉi realiĝoj ni parolos dum la venontaj semajnoj.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!